4-a Jaro. N-o 201 APERAS  SEMAJNE 9. Aŭgusto 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

FAŜISMA KULTURO

Kio okazas post dudek jarcentoj da kristanismo en la "civilizita" Italio

Jam multfoje estas signitaj en ĉi tiu organo la praktikoj, kiujn la posedantoj de la potenco uzas, por tenadi sian nemoralan regon kontraŭ la ĉiam pli forta progresado de la humana penso.

Ni rimarkis la mortigon de Sako kaj Vanceti, efektivigitan de la klasjusteco de la usonaj financestroj. Tiu ĉi mortigo de du homoj, kiuj havis la kuraĝon esti anarkistoj kaj konfesi sian opinion, okazigis skuon tra la tuta civilizita mondo. Tiu ĉi krimo de la kapitalismo forprenis al ĉiuj bonpensaj homoj la iluzion trovi rajton sub la nun reganta jura stato.

Oni devas posedi la plumon de Upton Sinkler (Sinclair), por povi priskribi la kruelajn agojn, faritajn de potencvoluptaj burĝidoj; por povi vortigi la malnoblajn mortigojn kaj perfortojn, faritajn de tiu ĉi riĉa friponaro al laboristoj kaj laboristinoj, kiuj batalis por pli bona socio.

Kaj tio okazis kaj ankoraŭ estas okazanta sub la protekto de la polico, kun la scio kaj kunlaboro de la plej altaj aŭtoritatuloj usonaj, en la lando, kiu estas fiera je sia kulturo kaj libereco . . . en la lando, kiu per tiuj ĉi malnoblaj krimoj estas signita kiel kovejo de malpureco kaj maljusteco, en la lando, kie krimo estas leĝo kaj humaneco krimo . . .

Kaj ni ankoraŭ ne scias ĉion. Ni ankoraŭ ne scias, kio okazas en alia, ankaŭ civilizita sin nomanta lando; ni ankoraŭ ne scias, kio estas okazanta en Italio.

La faŝista registaro gardas skrupule, ke la tie farataj krimoj restu kaŝataj kiel eble plej multe por la okuloj de la Homaro. Kiel skabia ŝafo timas strigilon, tiel la faŝista mortigistaro, sub la gvido de Musolini, timas la juĝon de la civilizita mondo. Nur de tempo al tempo iom da okazantaj nehumanaj agoj trapenetras ekster Faŝistion.

Ni ne faros la penon, priskribi ĉiujn



krimojn. Ni nur konstatas, ke la malbonfama mezepoka konkerinto Tamerlan, necivilizita kaj ne superfluinta per kristana amo al proksimulo, estus hontinta pri la praktikoj, kiuj estas uzataj de Musolini kaj lia friponaro. Nenia rimedo estas tro malbona al tiuj friponoj, por teni sian potencon. La itala burĝaro komprenas, ke ĝia potenco, bazita sur tia tirana sistemo, estos detruota post mallonga tempo kaj ke tiam ĝia pereo estos neevitebla. Pro tio ĝiaj malesperaj klopodoj por forigi kiel eble plej rapide kaj absolute ĉiujn elementojn, kiuj povus kunlabori al ĝia pereigo.

Oni provokas atencon, kulpigas ian socialiste pensantan laboriston, kaj li estas malliberigata por daŭro de 15 aŭ 20 jaroj, se li ne finas sian vivon sur la pendigilo. Eĉ la membreco ĉe organizo, kiu celas la progresadon de la Homaro, estas sufiĉa, por doni al iu 10 jarojn da punlaboro. Neniu plu estas certa je la faŝistaj banditoj. Eĉ mondkonataj scienculoj, verkistoj kaj profesoroj viktimiĝas sub tiu ĉi mortigfuriozo.

Antaŭ kelkaj monatoj nombron da profesoroj, verkistoj kaj studentoj, membroj de la kaŝe aganta intelektula organizo "La Juna Italio", estis arestataj. Inter ili troviĝas: Prof. Santino Caramella, la verkistoj Ermanno Bartellini, Segre, Lelio Basso kaj la fratoj Mazzitti el Genovo.

Tiuj ĉi homoj estas arestitaj sen iomo da pruvo de la kontraŭ ilin direktitaj kulpigoj, kiuj nur estas bazitaj sur la fakto, ke la arestitoj rifuzis fanfaroni la gloron de la faŝistoj. De tiu tempo oni ne scias, kio fariĝis el ili. Eĉ la parencoj ne scias, ĉu ili ankoraŭ vivas.

Membroj de la faŝista junular-organizo prirabas urbojn kaj kamparon. Ili fervore serĉas t. n. proprainiciate, kontraŭfaŝistajn laboristojn; ili turmentegas, eĉ mortigas ĉiun, kiun ili suspektas pri humaneco.

En la oficiala rakonto pri tiaj rabadoj oni tiam diras, ke nur estas kelkaj "nerespondecaj" elementoj, kiuj, defendante la ŝtaton, transpaŝis la limojn, pro sia sincera indignego. Ke oni severe agos kontraŭ ili. Ke al ĉiu faŝisto estas

ordonita, submeti sin al la partidisciplino kaj ne fari agojn propra iniciate. Sed neniam la polico sukcesas aresti tiujn ĉi elementojn... ĉar ĝi mem organizas kaj protektas tiujn ĉi agojn.

Oni ja aŭdas pri procesoj kontraŭ laboristoj.

Se ni citus ĉion, kio trapenetris al ni, — kaj tio nur estas malmultego el la realo okazinta, tiam ni ankoraŭ povus plenigi dikan libron per la kruelaj agoj de la faŝista teroro. Ni dume kontentiĝas doni nur kelkajn ekzemplojn:

La laboristo M. Gorniero, la 23-an de aprilo 1928 kulpigita, ĉar oni trovis dum loĝeja traserĉo numeron de la "Battaglie Sindicale", estis kondamnata je 4 jaroj da punlaboro.

La laboristo M. Molteni estis kondamnata je 7 jaroj kaj 6 monatoj, ĉar li ricevis komunistan pamfleton. Pro la sama kaŭzo la laboristoj A. Reinoldi kaj P. Zanoni estis kondamnataj ĉiu je 2 jaroj.

A. Scucchi donis al L. Stagnetti korporacibroŝuron kaj ricevis pro tiu kaŭzo 6 jarojn kaj 3 monatojn. Stagnetti ricevis 1 jaron kaj 3 monatojn, ĉar li preterlasis denunci la fakton.

La 25-an de aprilo 1928 la laboristo A. Dell'Aglio estis kulpigita, tial ke li priparolis kun personoj, kiuj restis nekonataj, rimedojn, por elvoki la civilmiliton kaj la ribelon kontraŭ la ŝtatpovo. Li estis kondamnata je 7 jaroj kaj 6 monatoj.

La 28-an de aprilo 1928, 16 laboristoj, membroj de la Komunista Partio, kiuj partoprenis al distriktkonferenco de tiu partio, estis, nur pro tio, kondamnataj kune je 87 jaroj da punlaboro. La punoj varias de 2 ĝis 12 jaroj. Tiu ĉi verdikto estis decidata, kiam ili jam estis en provizora malliberejo dum preskaŭ 2 jaroj, kun ĉiuj turmentegoj, dum la diversaj esploroj, sistema plej malmulta nutrado ktp.

Kontraŭ 20 membrojn de la Komunista Partio oni postulis 352 jarojn da punlaboro, nur pro tio ke ili estis membroj de tiu ĉi partio.

Tiujn ĉi faktojn ni ĉerpis el la itala ĵurnalo "Corriere della Sera" (Vespera Kuriero).

Fine ni ankoraŭ volas atentigi je la lasta atenco, kiu estis farata en Milano al la reĝo. Speciale por tio farita esploro sub la gvido de Anri Barbüs (france: Henri Barbusse), pruvis, ke tiu ĉi atenco estis la laboro de la faŝistoj mem. Estis ili, kiuj metis la bombon, kiu neniigis tiom da homvivoj; ili mem elpensis la atencon, kun la scio de la polico kaj juĝistaro, sub la gvido de la oficistoj de la ministraro de internaj aferoj, la komandantoj NUDI kaj PACENSA. Oni sciu nun, ke la atenco estis plenumata de la faŝista milicio de la "Carroccio Legion" en Milano. Tie oni devas serĉi la mortigintojn.

Sed oni arestis centojn da anarkistoj kaj komunistoj, kiujn oni turmentegis, por premi el ili konfesojn. Fine 6 el ili estis fiksataj kiel la "atencintoj". Ilia sorto ne estas duba: La morto aŭ ĝismorta punlaborado! Unu el la arestitoj, K-do Romeo Tranquilli, kiu klare pruvis, ke, en la momento de la atenco, ili tute ne estis en Milano, estas tiele turmentegita en la malliberejo de San Fedele de la barbaroj, ke 2 el liaj ripoj estas rompitaj kaj li, grave vundita, estis transportata al la malsanulejo de San Vittoro. Li nun estas en vivdanĝero.

Homoj, K-doj, jen la vizaĝo de Italio. Sango kaj krimo estas la kolonoj de la nuna reĝimo. Humaneco pereas en faŝisma barbareco.

La Sekretariaro de la A. J. I.
(Anarkista Junulara Internacio).

LA VERAJ REALISTOJ

Ĉu ni SAT-anoj sufiĉe pripensas la interdependecon de ĉiu raso en kultura, ekonomia kaj socia vivo? La unueco de civilizacio vere ne estas utopia sonĝo, sed fakto. Ni ekzamenu ekzemple la britan rason kaj ĝian evoluon. La plej frue konata homo en la britaj insuloj estas la Iberiano, kiu ankaŭ loĝis sur la norda bordo de Afriko, en nuna Hispanio kaj Francio. Tiam el aliaj partoj de la mondo venis la venkantaj Keltoj. Mallonge tiu raso ĝuis "sian" landon, ĉar almilitis ĝin la supernacia Roma Imperio. Dum kvar jarcentoj la sango miksiĝis, ĉar certe de biologia vidpunkto pro interbredebleco la Homaro estas unuo. Poste la Imperio disfalis, kaj invadis la landon unu post la alia la anglo-sakso, la dano kaj la normano, kiu lasta jam akiris la francan kulturon. Ne tiom vaste, sed longtempe ankoraŭ daŭris la enfluo flanke de la flandrano, la franca protestanto (t. n. hugenoto) kaj diversaj aliaj enmigrintoj. Vere la tiel nomata "vere deorigina anglo" estas hibrido ne el du, sed el multaj rasoj.

Kompreneble sekve de tio ankaŭ la brita lingvo estas miksaĵo. Baze ĝi formiĝis teŭtone (germanrase) kun latinaj kaj grekaj aldonoj, kaj moderne ĝi prunteprenis aŭ el la franca lingvo (ekz. garage, camouflage, chauffeur, fète ktp.) aŭ el usonaj vortaĉoj miksitaj de ĉiu naciano (ekz. flyvver, some go-getter, sure, gee, the once-over ktp.). La lastaj vortoj certe uziĝas ĉefe en interparolo, kaj kredeble la idiomoj kaj fuŝlingvo — uzitaj ekzemple en la verkoj de O. Henri — ne vivos longe.

La progresantaj scienco kaj filozofio ignoras la landlimojn. Bakon (anglo), Dekart (Descartes; franco), Spinoza (hebreo holanda) kaj Lejbnic (Leibnitz; germano) vice antaŭenpuŝis kaj progresigis la filozofion. Nuntempe la filozofo diskutas la argumentojn de Ĝejms (James; usonano), Russel (anglo), Bergson (franca hebreo), Kros (italo), kaj en sia verko pri historia materialismo Lenin devis diskuti kaj kritiki ĉiulingve laŭ la piednotoj.

En astronomio Koperniko (polo), Kepler (germano), Tiko Bra (dano), Galileo (italo) kaj Njuton (Newton; brito) kunlaboris unu post la alia. Por kunligi la mondon per la Radio, britaj scienculoj (Klark, Maksuel, Loĝ, Tompson) eksperimentis kaj verkis teoriojn, kiujn pruvis la germano Herc kaj aplikis Markoni, italo laŭ patro, irlandano laŭ patrino. En biologio Darŭin (Darwin; brito) estis sekvata de Pasteur (franco). La svedo Linius fondis botanikon, kaj la hindo Bose (Boz) nun tre riĉigas ĝin. En ĥemio Libig (germano), Mendelif (ruso) kaj Kruks (brito) estas memorindaj nomoj.

En literaturo Homero, Virgilio, Dante, Ŝejkspir, Cervantes, Molier', Göte verkis seplingve, sed ili apartenas ne al unu raso, sed al la Homaro. Ĉu la verkojn de Anatol Frans (France), Ĵak London, G. B. Ŝa (Shaw), Gorki ŝatas nur iliaj samlingvanoj?

En ekonomio laŭnaskiĝa germano Marks studis la teoriojn de ĉiulandaj ekonomiistoj en Londona ĉeflibrejo kaj alvokis laboristojn de la tuta mondo. Liaj verkoj estas tradukitaj multlingven kaj estas aplikataj en Sovetio en vido de la terglobo.

Nuntempe en Londono kongresas laktistoj el 42 landoj. La 7-an de julio la kooperativa movado festis en 35 landoj sian kreskon. Kurioza afero estas, ke la nuna brita registaro, kiu elspezis multe da publika mono por reklami la devizon: "Aĉetu nur britajn varojn", devas mem aĉeti adresmaŝinojn, elektrilojn kaj telegrafilojn el Germanio; skribmaŝinojn kaj falŝirmilojn el Usono.

Plej bona internacia kunlaboro okazis en la kuracado: Pasteur (la franco) malkovris la mikrobon: Listêr (la anglo) montris, kiel protekti vundojn kontraŭ ĝi per antisepsilo; Simpson (la skoto) helpis operaciadon en ĉiu malsanulejo de la mondo per sia elpenso de kloroformo. La germano Koĥ

izolis la tuberkulozan bacilon, kiu detruas la homon sennaciece. Iuj tiaspecaj antaŭenpaŝoj aplikiĝis ĉiulande. En Britio ĵus okazis, ke la burĝaj ĵurnaloj devis laŭdi la sovetiajn savantojn de la italoj sub Nobile, kiuj fluge serĉis la nordan poluson.

Amuziĝante ni ankaŭ forgesas pri nacieco. Ĉaplin ridigas per filmo homojn en ĉiu parto de la globo sen helpo de tradukanto. Kiam Karuzo kantis, ankaŭ Ĉaljapin, ni forgesas pri la itala kaj rusa deveno de la artistoj. Ni legas la verkojn de alilandaj aŭtoroj ĉiufake; per la Radio ni partoprenas en internaciaj koncertoj; ni legas pri bonvenigo de usona aviadisto per la pariza popolamaso post lia triumfa transflugo de l' Atlantiko. La burĝo en la verko de Delezi (Delaisi) interrilatis kun ĉiu lando en sia negoco, kaj eĉ ni simplaj laboristoj vidas sur niaj pli malluksaj tabloj reprezentantojn el multaj landoj. Certe ni lernas per akra sperto en suferado, ke ni devas batali laŭ mondskalo por atingi liberecon. Apartecon de nacioj kaj homoj jam detruis la transportiloj, la kablo, la aeroplano, la Radio.

La mondo malgrandiĝis multe, depost kiam niaj prapatroj vagis en izoleco kiel nomadoj. La homa voĉo sonas de lando al lando tiom rapide kiel la fulm-ekbrilo. La ekonomia interdependeco de la mondo estas fakto. SAT-anoj nur pioniras en konscia agnosko de la nuna evoluo de l' socio. Ni penas, ke la vidpunkto akordiĝu kun la nuna stato de scienca kaj ekonomia vivo. (488)

FAKTOJ SEN KOMENTOJ

Ne en iu laborista gazeto, sed en la libro de franca generalo Denvinj' (Denvignes) ni trovis jenajn ciferojn pri la militperdoj:

"Ĉu oni scias, ke la materiaj perdoj de ĉiuj (per la milito 1914/18, Red.) estas taksataj je 340 miliardoj da dolaroj? Ĉu oni scias, ke 12 milionoj da homoj mortis, kaj ke 20 milionoj estis vundataj pli malpli grave? Ĉu oni scias, ke por ĉiu soldato mortigita, kvin civiluloj mortis pro mizero, malsano aŭ perforta morto, kaj ke oni devas aldoni al la sumo suprecitita 50—60 milionojn da mortintoj? Tiel do 4 jaroj da milito forprenis de Eŭropo 70—75 milionojn da vivaj estaĵoj, dum samtempe la naskiĝoj havis deficiton da proks. 10 milionoj ..."

* * *

La urbestro de Londono publike alvokis pri subteno por la suferanta karbministaro. De 3. aprilo ĝis 29. junio alvenis 89 000 funtoj sterl. Komparu tiun sumon kun 240 000 funtoj kolektitaj dum 16 tagoj por la polica kaso kiel rekompenco kaj danko post la nacia striko en 1926!

* * *

Katolika laborista kongreso ĵus okazinta en Kolonjo (Germ.) fondis novan Internacion (de katolikaj laboristoj) kaj formulis i. a. jenajn kontraŭkapitalismajn parolojn: "... Neniam la laborista klaso katolika permesos, ke ekonomia entrepreno estu afero pure privata, nur ekzistanta por la profito. Neniam ĝi permesos, ke la homo estu nur senvalora ilo, propraĵo de l' entrepreno, al kiu estas ligitaj liaj destinoj kaj tiuj de lia familio. ... Kun helpo de la klas-organizoj kaj per ilia perado al pli superaj formoj de la socia vivo: tia estas la signalvorto de la nova Internacio."

Ĉu la diabla klasbatalemo eniras la katolikajn rondojn? Ĉu la papo permesos tion?

GRAVA ATENTIGO

Al ĉiuj SAT-perantoj! Al ĉiuj SAT-anoj!

En la balotilo sendita kune kun la Jarlibro troviĝas tre bedaŭrinda preseraro, kiu tute malkomprenebligas la pribalotatan proponon **3**. *Tiu propono ne rilatas al la paragrafo 5, kiel estas erare presite sur la balotilo, sed al la paragrafo* **11**, *kiel estas ĝuste presite en la n-o 150/51, en kiu aperis la propono.*

Ni tre ĉagreniĝas pro tiu eraro kaj insistas por ke ĉiuj perantoj, ĉiuj aktivuloj de nia movado atentigu la SAT-anojn pri necesa korekto.

La afero ŝajnas al ni despli bedaŭrinda, kaj nepre korektinda, ke temas pri propono, kies graveco estas esenca por la estonto de nia movado. Temas ja decidi, ĉu kreiĝos ia sektorisma patriotismo, aŭ ĉu la tuta SAT-anaro fakte povos influi sur la gvidadon de la aparato en ĝia tuteco. Se nuntempe la afero ŝajnas sensignifa, principe ĝi estas tamen tre grava kaj meritas la atenton de ĉiuj voĉdonontoj. Ni ne dubas, ke ili konsentos kun la decido de la kongreso kaj akceptos la ŝanĝon.

Semajno el niaj Ferioj[1]

Esperanto-lernejo dumferia 1.—7. 7. 1928 en la kabano de la Natur-Amikoj, grupo Kehlheim a. Danubo (Bavario)

Ĉi okaze ne temas priskribi individuan travivaĵon, sed la spertojn de lernema laborista rondo.

La bavara distrikto de germ. LEA[2]) okazigis esperanto-lernejon dumferian, por eduki stabon da bonaj kaj kapablaj instruontoj kaj antaŭ ĉio trovi rimedojn por forigi la mankojn kaj malhelpojn, kiuj ankoraŭ baras nian antaŭen-iradon kaj disvolviĝon. Kelkaj tiufake kompetentaj K-doj anoncis sian partoprenon, sed retiriĝis. Preskaŭ oni havis la penson, ke la tuta entrepreno fiaskos. Do, kiel agrabla estis la disreviĝo, kiam ni (Stuttgartaj K-doj) alvenis ĉe nia celo, nia unusemajna "akademio", kaj estis salutataj de la jam ĉeestantaj bavariaj K-doj. Tuj foriĝis ĉiaj duboj pri eventuala malsukceso.

Se la ĉirkaŭaĵo influas la homon kaj ties pensadon, tiam ĝustas ĉi-okaze tiu difino en la vera senco de la vorto: La idilia situo de la kabano, la serena ĉielo kaj bonfara suno, la per la "civilizacio" ne makulita ĉirkaŭaĵo (arbaro kaj herbejoj), kaj la ebleco malstreĉi la nervojn ruinigitajn de la ĉiutaga maltrankvilo kaj ekscitiĝo, promesis agrablan, sanigan kaj fruktodonan restadon. Laboro kaj amuzo alternis reciproke. La tre proksima arbaro disponis sian ombron, la suno siajn varmigajn radiojn kaj la bedaŭrinde ne proksima rivero sian malsekaĵon. La volo de reciproka helpemo, fonto de freŝa forto kaj kuraĝo al novaj agoj kaj faroj, kunligis al granda familio. Ĉiu tuj demetis la civilizajn katenojn: vestitaj nur per bankalsono kaj ĉemizeto ni pasigis tutan semajnon.

Ĉar nun instruado, nutrado kaj loĝado okazis kune en la jam citita kabano, oni povis tute eluzi la disponeblan tempon, ankaŭ tiun, kiun oni estus bezoninta por al- kaj reiro (al loĝejo kaj manĝejo). Faktoro tre atentinda ĉe tiaj entreprenoj, por ke oni havu, malgraŭ plej intensa laboro, ankoraŭ sufiĉe da disponebla tempo por refreŝigo kaj ripozo. Pruvo, ke oni facile povas kunligi feriojn kaj lernadon, ludon kaj laboron, sen troigo de unu faktoro kaj malzorgo de alia, por la bono kaj utilo de la partoprenantoj kaj laborula klaso ĝenerale.

La programo estis jena: 1. Historio de esperanto, 2. Propagando, 3. Provlecionoj laŭ ambaŭ metodoj, rekta kaj nerekta (gramatika), 4. Raportoj pri: a) Junular-demandoj, b) Esperanto kaj lab. sportularo, c) Vegetarismo, ĉ) Esperanto kaj milito. K-do Deubler, la iniciatoro de la lernejo, gvidis la lernadon. Ni leviĝis ĉiutage je la 6-a. Je la 7-a komenciĝis la kurso, kiu daŭris ĝis la 11½-a seninterrompe, krom mallongaj paŭzoj. Tiam sekvis komuna tagmanĝo en la kabano kaj paŭzo ĝis la 14-a. Posttagmeze okazis aŭ daŭrigo de la lernado aŭ komuna ekskurso en la arbaron aŭ bano en la rivero. Vespere oni daŭrigis la lernadon kelkfoje ĝis la 21-a ĝis 22-a. Menciinde estas, ke oni uzis nur esperanton dum la instruado kaj ankaŭ dum la konversacio eksterkurse. Al ĉiu K-do estis konfidata tasko, kiun li devis pritrakti esperantlingve. Kvankam la disponebla tempo ŝajnis iom ne sufiĉa por ĝisfunde prepari la farotan taskon, rimarkiĝis, ke

[1]) Ferioj = libertempo.
[2]) LEA-anoj kaj SAT-anoj; ili estas la samaj personoj; tial ne ekzistas malharmonio.

Letero el Portugalio

Post la februara revolucio en 1927 la kolonelo Ferreira de Amaral kiel komisiito de la portugala burĝaro sendis ĉiujn klaskonsciajn laboristojn, kiujn lia spionanta okulo kaj lia flarema nazo taksis kiel krimulojn, al la plej malbona loko en Afriko, al Malange, la nova Siberio. La ekziladoj okazis sub falsa atesto pri "krimagoj" laboristaj.

Niaj K-doj vivaĉas tie pli malbone ol krimuloj. Matene je la 5-a horo la malliberuloj leviĝas kaj estas veturigataj vagonare al la laborloko. Ili estas transportataj pli malkomforte ol brutaro. Se la vetero estas pluvema, la inĝeniero ordonas transporti ilin per malfermitaj vagonoj. Kontraŭe, se ĝi estas bela, oni veturigas la laboristojn per fermitaj vagonoj, t. n. "jotas" (fermitaj ŝarĝvagonoj por brutaro). Kompreneble, kiam pluvas, la laboristoj alvenas en la laborlokon malsekigitaj de kapo ĝis piedoj kaj komencas tiel labori. La plejmulto estas duonnuda kaj senŝua. Ili konstruas la fervojon de Malange kaj faras la tutan laboron per pioĉo kaj ŝovelilo.

Ĉirkaŭ la oka horo ili estas reveturigataj en la malliberejon. Oni povas imagi la laborkondiĉojn, se oni scias, kia klimato regas tie en ĉi tiu sezono. La homoj ricevas kiel laborpagon duoneskudon tage. Se laboristo malsanas, oni tuj devigas per vipo lin labori. La plej ofta malsano estas infekto kaŭzata de pulsimila besto ("bitacaia"), kiu eniras la haŭton de ĉiuj senŝuaj personoj. Sekve de tio ili grave malsaniĝas, kaj antaŭtage nia K-do Kristovao Pinheiro el Lisboa mortis! Nia malfeliĉa K-do longe suferis, ĉar anstataŭ kuraciloj oni donis batojn.

Alian K-don, kiu rakontis pri la tiea situacio, oni devigis dehaki arbon dum unu sola tago! Kutime oni bezonas 5 ĝis 6 labortagojn por tion fari. Apudsidantaj sur ŝtono, la oficiro kaj la inĝeniero ĝuis la spektaklon. Plej ofta puno estas porti surdorse "ĉulipas" (fervojaĵojn) laŭ dukilometra vojo. La gardanta negro malpermesas ripozon laŭ ordono de l' estraro. Plej terura puno estas la t. n. "tronco". Ĝi konsistas el ligna skatolego, kiun oni metas en la "jota"-vagonon, lasante iom da spaco inter ĝi kaj la vagonmuroj. La skatolo havas ok truojn, en kiujn oni premas la piedojn de la kondamnitoj. Ĉi tiuj kuŝas dorse en la skatolego, la piedoj en la truoj. Por malebligi fortiron de la piedoj, oni surmetas lignan pecon mallarĝigante la truon laŭ la krurdikeco. Tiel restas la kondamnita persono de 20 ĝis 90 tagoj, dum kiuj li ricevas malmultan manĝon kaj multan vipadon. Tiel li kuŝas kaj faras ĉion al li necesan.

Jen faktoj, kiuj honoras la landon, kiu fanfaronas civilizi la negrojn en siaj transmaraj kolonioj! Tiuj faktoj parolas elokvente pri la situacio de laboristaro en demokratia lando kaj ankaŭ pri la admirinde saĝa diktatoro Carmona, la moderna inkvizitoro, kaj liaj fihelpantoj.

Laŭ kontraŭestrara flugfolio trad.
Lisboa SAT-ano.

Studenta Sekcio de SAT

Adreso de la Redaktoro de S. S. P.:
Dm. Snejko, Poŝtkesto 33, Minsk
(Sovetio)

Redaktora babilado

Niaj linioj iom malfruiĝis en la aperado sur la paĝoj de "S-ulo". Tiu prokrasto okazis, ĉar neniu el niaj kunlaborantoj sendis ian materialon. Ĉu necesas multe paroli pri tio? K-doj SAT-studentoj devus bone kompreni sian devon kaj ĉiu povus, unu fojon dum du monatoj, verki artikoleton por nia "Sennaciula Studenta Paĝo". — Dum la SAT-kongreso nia Sekcio intencas organizi sekci-kunsidon, se alvenos kelkaj sekcianoj. Ni nun laboras jam preskaŭ unu jaron. Ni kolektis sufiĉajn spertojn por pripensi nian laboron por la venonta jaro. Ni deziras ricevi de ĉiuj SAT-studentoj iliajn opiniojn pri la estonta laboro de la Sekcio. Tute malkaŝe dirite — en la laboro de nia Sekcio partoprenis nur kelkaj K-doj, aliaj studentoj en SAT nur aliĝis al la Sekcio kaj nenion faris. Sed ni ĉiuj devas labori! Eĉ kelkaj estraranoj ne laboris aktive por la Sekcio. En la du proksimaj monatoj ni devas plenumi ĉiujn organizajn aferojn, por poste komenci nian pli aktivan agadon. Ni devas kaj povas helpi al SAT en la aperigo de la sciencaj n-oj de "Sennacieca Revuo". Ĝis nun studentoj nenion faris tiufake. Ni alvokas studentojn por aktiva kunlaboro en "S. R.". Skribu ankaŭ senprokraste, kiu el vi partoprenos la 8-an kongreson en Göteborg.

---

tio estis bona ekzerco por rapide kaj improvize reprodukti temojn kaj paroladojn.

La historio de esperanto estis pritraktata de kelkaj K-doj en formo de parolado: Esperanto antaŭ, dum kaj post la milito. Pri Laboristaro kaj esperanto oni legu "For la Neŭtralismon!". El la Deklaracio pri esperantismo estis konstatinda tezo, ke "esperanto estu komunaĵo kaj nenies posedaĵo". Tiu rezigno de Zamenhof je ĉia aŭtor-rajto ebligis la relative rapidan evoluon kaj disvastiĝon de la lingvo. Ke oni la disfalon de Volapük ne nur serĉu en ĝia malfacileco, sed ankaŭ en la aŭtokrateco de la aŭtoro, Schleyer, mem.

Rilate al propagando oni trovis taŭga, ne ĉiam aranĝi apartan propagand-kunvenon, kiam temas nur pri kurskomenco. Konsilinde estas, doni mallongan skizeton pri esperanto kaj ĝia valoro kaj utilo por la laborula klaso tuj ĉe komenco de la instruado mem. Unue oni ŝparas tempon, penon kaj monon; due la interesuloj tuj povas ekkompreni, kio estas esperanto. Sed des pli oni eluzu ĉiajn okazojn, por prezenti nian helpon pere de internacia kolektiva korespondado. Ĉiu lab. esperantisto estu aktiva varbanto en siaj rondoj.

Alterne ĉiu K-do devis prezenti provlecionon, dum kiu la kursanoj devis servi kiel komencantoj, por tiele trovi unuecforman instrumetodon. Ĉiuj klopodis ŝajnigi sin kiel eble plej naivaj, kio havis kiel sekvon kelkfoje gajigajn scenojn. Sed la kulmino[1]) de la tuta dumferia lernejo, kio rilatas kurson, estis provkurso kun hazarde ĉeestantaj laborej-lernantoj de maŝinfabriko. K-do Deubler instruis ilin laŭ rekta metodo. La atentemo de la lernantoj estis vere modela kaj pruvilo por la lernej-kursanoj. Per posta komuna kantado oni donis al la laborej-lernantoj okazon tuj praktike apliki sian ĵusan akiraĵon.

Pri la apliko de rekta aŭ nerekta (gramatika) metodo montriĝis laŭ faritaj spertoj, ke la rekta metodo estas komence pli facila, sed des pli malfacila je la fino, ke oni devas scipovi kombini ambaŭ metodojn, por tiele egaligi la mankojn kaj utilojn de

[1]) Plej supra punkto.

En nia malgranda rondeto estis pritraktataj problemoj, kiuj meritus konsideron en ĉiuj lab. rondoj. Kvankam, pro la rimedoj por kontraŭbatali kaj malebligi militojn, la opinioj iom disiris — ĝi ja estas la plej malfacila kaj plej grava el ĉiuj problemoj —, oni tamen interkonsentiĝis, ke nura b u ŝ p i n t i g o ne helpas, sed ke oni ankaŭ devas f a j f i. Ke oni sin okupu pri tiu demando ĉiutempe kaj ĉiuloke, kaj ne atendu ĝis la militfurio kun sia brulegiga torĉo trapaŝu la landojn. (Por pli profunde studi la demandon pri la deveno de militoj, oni legu la broŝureton de Ĵak London: "La forto de la fortaj", havebla ĉe: Administrejo de SAT, prezo 15 pf.)

Kiel rezulton el la aliaj lekcioj: Junular- kaj Lab. sportular-demandoj estu resume sciigate: Peru internacian kolektivan korespondadon kun samaj organizoj alilandaj; per tio vi plej efike pruvas la taŭgecon de esperanto por ĉiuj celoj kaj fakoj de la Proletaro. Fariĝu vojfarantaj pioniroj de la popolinterfratiĝo. Pri vegetarismo oni trovis, ke ekzistas diversaj tendencoj; kiuj havas etikajn aŭ sanigajn kaŭzojn. Sed

TRA STUDENTIO

En Sovetio alvenis delegitaro de studentoj el Norvegio, Danio kaj Svedio por konatiĝi kun la vivo en Sovetio. Moskvaj studentoj solene akceptis siajn gastojn.

* * *

La 30-an de julio okazis en Bruselo la Internacia Esperanto-Konferenco de Universitatanoj (profesoroj, studentoj kaj diplomitoj). El la tagordo ni citas: La stato de l' movado en diverslandaj universitataj rondoj. — La koncentrigo kaj racia organizado de esp. universitatanaro en organizoj laŭ landoj kaj internaciskale. — Propagandaparato kaj ĝia taktiko. — Aplikadaparato kaj starigo de div. servoj. — Diversaĵoj.

——«o»——

Petoj

— K-dino Marija Sneĵko, Minsk, Poŝtkesto 33, interesiĝas pri la abortdemando en div. landoj, same pri la prostituo. Interŝanĝas per materialo.

— Ne forgesu skribi artikolojn por sovetia studenta ĵurnalo "Ruĝa Studentaro", kiu volonte akceptas nian materialon k leterojn de eksterlandaj studentoj. Nun Centra Oficejo de Prolet-Studentaro diskutas la demandon pri esp-o, k viaj leteroj k artikoloj estas tre bezonataj.

— Informu redakcion de "SSP", ĉu en via lando aperas studenta ĵurnalo revolucia, donu ĝian nomon k adreson. Se vi povas, sendu provekzempleron.

——«o»——

Sendu materialon por la sekvonta "Sennaciula Studenta Paĝo"!

——«o»——

Kunlaboru en "S-ulo" kaj "Senn. Revuo". — Ĉiu SAT-studento estu abonanto de "S-ulo"!

---

pri tio regis unueca opinio, ke oni ne povas postuli, ke unuj manĝu viandon, por ke aliaj povu surmeti tutledajn pantalonojn kaj ŝelkojn kun transversaj rimenegoj, kaj ke oni ne en ĉiuj klimatoj povas 100%-e vivi laŭ sia idealo, ĉar la homo ankoraŭ multfoje estas viktimo de cirkonstancoj. (Legu la artikolon en "S-ulo" ("Inter Ni", n-o 195). —

Kvankam tio estis la unua provo de distrikt-skala dumferia lernejo, oni tamen ne povas refuti iagradan sukceson, ĉar kelkaj K-doj, kiuj ĝis nun havis nek kuraĝon nek eblon por publike apliki esperanton, sin sentis sufiĉe kapablaj por partopreni tre aktive je la laboroj kaj aranĝoj de la kurso. Sukceso, kiun oni ne povas ignori, se ĝi ankaŭ ne estas mezurebla per colmezurilo kaj kontrolhorloĝo. Ĉiuj kursanoj estis movataj de volo al ago, kun emo kaj amo al la afero kaj ĝia sukceso. Neniu kaŝis sian ideologian tendencon. Ĉiu klopodis konduti plej kamaradece. Ni vere travivis epoketon de socialismo. Ĝi restos en ĉies memoro. Ĉeestis 19 Gek-doj el 9 grupoj.

H. N. (511).

NIA POŜTO

6931. — Pri la studenta kunsido legu en komunikoj de K. K. Pri rabato turnu vin al la Centra Of. de Proletstud. en Moskvo; eble ĝi helpos al vi veturi Göteborg-on.

8241. — Aliĝon ni ricevis. Liston de sekcianoj ni presos en "SSP".

Suslov, V. P. — Legu pri nia sekcio en n-oj 131, 132, 140, 148 k. a. de "S-ulo" (havebla ĉe Admin. de SAT). Aliĝu al Sekcio k kunlaboru. Ni atendas art. pri vivo k laboro de via universitato.

E. Salan, Nîmes. — Ĉu nia sendaĵo de 3. 4. 1928 trafis vin?

J. Varankin, N. N. — Aliĝon ni ricevis. Pri aliaj demandoj ni dume ne zorgis.

La Redakcio intencas organizi helpon al sekcianoj-studentoj, kiuj studas iujn problemojn aŭ lingvojn, per kunligo de K-doj el div. landoj interesataj pri sama problemo. Sendu viajn petojn al Red.



TAGO EL MIA VIVO

Multajn "tagojn" mi legis. Ĉiam la sama kanto pri la panakira laboro diversspeca kaj poste kolektado de nova forto por... nova laboro. Kaj tiel ripetiĝas de tago al tago la proleta vivo! Mi provu priskribi miajn pensojn dum la ĉiutaga okupado.



Jam je la kvina mi devas ellitiĝi, somere kaj vintre tutegale. Malbelaj pensoj ofte trapasas la ankoraŭ dormeman cerbon dum vintro, kiam la fenestro estas tute glaciiĝinta kaj la neĝventego ĉirkaŭbruas la vilaĝajn domojn. Sed nenia protesto utilas: je la sepa kaj kvarono eksonas la fajfilo de malproksima fabriko, kiun mi atingas nur post biciklado de dektri-kilometra vojo. Kia plezuro dum vintra vetero! Post lavo kaj kafotrinko mi prenas la ŝtalĉevalon kaj forrajdas, komence sole, sed trapasinte la duan vilaĝon kune kun samsortanoj, kiuj estas feliĉaj povi rapidi por servi al la dio Kapitalo. Je la sepa mi atingas la celon, ŝovas la ĉevalon en la destinitan ejon, prenas de sur kontroltablo la ladan numero-markon kaj nun ne plu estas homo sen numero. Mi demetas la stratveston kaj surmetas laborkitelon. Jam aŭdiĝas la signalo, kaj la dancado de la maŝinoj komenciĝas. Mi ferrabotas partojn uzotajn ĉe la konstruado de vagonoj kaj aliaj veturiloj. Tre vigle oni devas movi la manojn, kiuj funkciigas la du rabotmaŝinojn, ĉar ĉiu laboro estas pagata po peco, kaj la popecaj prezoj ne estas altaj. Je la dekunua kaj duono estas duonhora paŭzo por tagmanĝi. Kiam la signalo eksonas, ĉiu kiel eble plej rapidas por plenŝtopi siajn intestojn, ĉar dum la laboro ne estas okazo manĝi, aŭ oni devas preni pecon da pano en unu mano kaj labori nur per la alia. La laboro daŭras tiam de la dekdua ĝis la deksesa kaj kvarono. Tiam mi ekspiras aŭdante la signalon por hejmeniro. La aero en mia laborejo certe ne estas sanigilo por la pulmo: polvamasoj ĉirkaŭflugas, kaj el la granda forĝejo enpenetras sufiĉe da gaso kaj fumo. Sekve oni vere ekspiras forlasante la ejon. Ree alpendiginte la ladan numeron, mi suriras mian biciklon kaj povas ree esti homo.

Alveninte hejmen, mi unue (somere) trairas mian malgrandan ĝardenon, rigardante rozojn dumtage ekflorintajn kaj aliajn florojn. Poste mi eniras la dometon, lavas min, manĝas iomete, trarigardas gazetojn kaj korespondaĵojn, skribas, legas aŭ laboras en la ĝardeno, vizitas kunvenojn partiajn aŭ sindikatajn ktp. Dum vintro mi ankaŭ unufoje semajne instruas esperanton en kurso por komencantoj, dum somero nur laŭ bezono. Dimanĉe mi ekskursas bicikle, piede aŭ vagonare ien, kie la naturo estas bela, kaj tio estas mia "diservo".

Tiel mi vivas tagon post tago, kaj ĉiutage en mia cerbo ripetiĝas la demando: "Ĉu tio devas esti tiel?" Ni laboras, laboras konstante — sed pro kio? (6269).

"Esperanto", Göteborg I

Ĉiujn poŝtaĵojn al la Kongreso sendu al supre citita adreso. Ankaŭ izolaj esp-istoj povas uzi ĉi adreson por siaj poŝtaĵoj.

ATENTIGO POR ĈIUJ SAT-ANOJ. La Jarlibro 1928 estas ekspedita al ĉiuj membroj de SAT, kiuj pagis sian kotizon por la jaro 1928, inter la 23. kaj 27. julio. Sekve ĉiu K-do devas esti ricevinta ĝin, se la poŝtservo regule funkciis.

Malmultekoste! **Malmultekoste!**

GROMADA

(Blankrusia Kamparan-Laborista Unio)

Tradukita de **Dim. Sneĵko** kaj eldonita de **Komitato de Sciencaj Laborantoj kaj verkistoj de BSSR, Minsk.**

Kiu ne konas la celojn de "Gromada", nepre legu ĉi tiun broŝuron. Post legado li estos komplete informita. — Bona papero, bona preso kaj bonega esp. stilo faciligas la legadon.

Formato 23×15½ cm., 31 paĝoj.

Prezo nur 0,30 mk. g. inkluzive afranko.

—o—

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

TRA ESPERANTIO

Al Göteborg!

Jam multaj K-doj estas survoje al la kongresa urbo. Diligente laboras la Kongreskomitato. Ni havas la konvinkon, ke ĉiuj kongresontoj kontentos pri la aranĝo. Ĝojiga estas la konstato pri la nombro de aliĝintoj. Sur apuda listo ni ja povas vidi, ke jam pli ol 400 sin anoncis. Certe aliaj ankoraŭ aliĝis intertempe kaj la plena listo kredeble entenos preskaŭ 500 kongresanojn.

Sendube ne ĉiuj aliĝintoj povos korpe partopreni; sed anime ĉiuj ĉeestos en Göteborg. Kaj ne nur la kongresaliĝintoj, sed ĉiuj SAT-anoj. Se oni konsideras, ke nia movado konsistas el elementoj, kies solaj vivrimedoj estas ilia salajro, oni povas prave aserti, ke neniu movado entenas pli da entuziasmo, pli da sindonemo, pli da fervoro ol la nia.

Kial tia fervoro kaj entuziasmo? Tial ke ĉiu el ni pli malpli klare konscias, ke SAT estas nepre necesa organizo por prepari la emancipon de nia klaso. Kiam laboristoj el plej malproksimaj landoj renkontiĝas kaj facile interkompreniĝas pere de artefarita lingvo, tiam ili bone sentas, ke kuŝas en tiu simpla fakto io granda, konsekvencoplena — revoluciiga. Plilarĝiĝas la horizonto; plialtiĝas la pensoj kaj plifirmiĝas la konvinko pri la valoro kaj neceso de nia esperanta laboro.

Ĉe tia konstato oni bone komprenas, ke la barakto de politikaj tendencoj ne konsistigas sufiĉan forton por malhelpi la normalan funkciadon kaj malvolviĝon de nia movado. Superregas ilin pli solida forto, nome la konvinko, ke ĉiuj laboristaj partioj aŭ organizoj senescepte bezonas esperanton por atingi siajn celojn. Kaj sekve ĉiuj malsampartiaj K-doj havas la saman intereson labori en SAT por trudi al la tuta laborista movado la alprenon de esperanto.

En Göteborg la kongresanoj havos la eblon kontroli la laboron de la SAT-estraro; ili povos fari kritikojn, doni konsilojn kaj eĉ eksigi la gvidantojn. Tial ke neniu el ĉi tiuj lastaj tiras profiton el sia funkcio, ne estas timinde, ke okazos intrigoj por resti ĉe posteno, kiu postulas nur sendankan laboron.

Ni ne dubas, ke nia VIII-a estos plensukcesa. Pligrandigos ĝian sukceson kaj aŭtoritaton la fakto, ke okazos samtempe konferenco, kies organizadon bonvolis preni sur sin K-do M. Starr. Kia ajn estos ĝia rezulto, ni almenaŭ povos multe lerni el tiu unua eksperimento. Ni provos niajn fortojn, por ekscii kion ni povos entrepreni en proksima tempo.

Ni veturu al Göteborg kun la firma kredo, ke ĉio funkcios glate, harmonie kaj esperige . . .

E. L.

8-a Kongreso de SAT
en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: Einar Adamson, "Esperanto", Göteborg 1 (Svedio).

14-a komuniko

Kamaradoj! La kongresanoj, kiuj traveturos Stokholmon, solaj aŭ en karavano, estas petataj komuniki al la akcepta komitato en Stokholmo sian alvenon. Skribu aŭ telegrafu al: Ernst Eriksson, Västerasgatan 2, Stokholmo aŭ al Kristian Vikner, Enskedevägen 14, Göteborg.

Kongresanoj, kiuj venas de Germanio, povas en Trelleborg interrilati kun K-do Otto Jönsson, Frihedsgatan 8. Eble svedaj K-doj el Trelleborg kaj el Malmö veturos samtempe, se vi sciigos pri via alveturo.

Ĉiuj kongresanoj devas absolute aranĝi, ke ili povas esti en Göteborg plej malfrue la 14-an antaŭtagmeze. Se vi ne anoncas pri via alveno, bonvolu tuj viziti la kongresejon: Realläroverket, Vasagatan, por ricevi dokumentojn.

La 11-a listo de aliĝintoj

400	Kurt Vogel, Leipzig, Germanio	
401	Jean Pinty, Alger, Alĝerio . . .	8557
402	K-dino Pinty, Alger, Alĝerio . .	
403	Ture Olsson, Örebro, Svedio . .	
404	Wilh. Johansson, Göteborg, Sved.	11 512
405	Viktor Bonde, Falun, Svedio . .	
406	Josef Nilson, Billesholms gruva, Svedio	
407	Alseika Lindas, Taurage, Litovio	
408	M. Holmgren, Göteborg, Svedio	11 534
409	Gunnar Ljungkvist, Slöinge, Sved.	
410	Erik Ljungkvist, Slöinge, Svedio	
411	Edvin Rosen, Slöinge, Svedio .	
412	Carl Ljungkvist, Slöinge, Svedio	
413	Erik Persson, Skoghall, Svedio .	
414	Clas Larsson, Skoghall, Svedio .	
415	Nils Rönnbäck, Stockholm, Sved.	
416	Walter Nöbel, Altenburg, Germ.	
417	Rudolf Herrmann, Gera, Germ .	
418	Ludw. Gammel, München, Germ.	
419	L. Borg, Odense, Danio	
420	Nils Olofsson, Stockholm, Svedio	
421	Helge Johansson, Stockholm, Svedio	
422	Erik Nykvist, Stockholm, Svedio	
423	Astrid Nykvist, Stockholm, Sved.	
424	Elvina Vedberg, Stockholm, Sved.	
425	Frida Viberg, Stockholm, Svedio	
426	Margareta Broström, Stockholm, Svedio	

Tagordo de la 8-a SAT-Kongreso

1. Malferma Kunsido: (sub la gvidado de la Organiza Komitato).

2. Unua Laborkunsido: a) Elekto de la Kongresestraro; b) Legado de salutleteroj; c) Elekto de Komisiono por pristudo de la publikigitaj proponoj.

3. Dua Laborkunsido: Raportoj de la SAT-Estraro: a) Ekzekutiva Komitato (E. K.); b) Rilatoj Sennacieca Konsilantaro k E. K.; c) Rilatoj inter SAT k LEA; ĉ) Rilatoj inter SAT k la neŭtrala movado; d) Redaktora demando; e) Administra Komisiono; f) Kontrolkomitato; g) Jarlibro; ĝ) Literatura Komisiono; h) Diversaĵoj; ĥ) Raporto de la Administracio.

4. Tria Laborkunsido: Raportoj de la SAT-Estraro (daŭrigo): a) Debato pri la jam faritaj raportoj; b) Raporto pri "Sennaciulo"; c) Raporto pri "La Lernanto"; d) Raporto pri "Sennacieca Revuo". — Debato.

5. Kvara Laborkunsido: Raporto pri la Programkomisiono. — Debato.

6. Kvina Laborkunsido: Raporto de la Proponkomisiono. — Debato.

7. Sesa Laborkunsido: Raporto pri la SAT-konferenco. — Diversaĵoj — Ĝeneralaj Konkludoj pri la gvidado de SAT.

Fakkunsidoj okazos ekster tiuj ĝeneralaj kunsidoj. La fakuloj mem difinas sian tagordon.

DIREKCIO DE SAT.

PRIKONGRESAJ PROPONOJ

Propono 16

Oni kreu Literaturan Sekcion de SAT konforme al paragrafo 1, punkto d) de la Statuto. Ĝi konsistu el literaturistoj k literaturamantoj kaj nomiĝu "Esp. Literatur-Amikaro ĉe SAT". Ĝia celo, krei sennaciecan literaturon, tiel originalan kiel tradukan, organizi ĉiujn literaturajn fortojn en SAT, propagandi esp-on inter naciaj literaturistoj, sistemigi tradukadon, kontrolinterŝanĝi manuskriptojn, reguligi evoluon de nia lingvo. Ĝi sendu reprezentantojn en la nunan Lingvan Komitaton. Ĝi eldonu specialan pres-organon en formato de "La Lernanto".

E. Miĥalski (1164).

I-a SAT-KONFERENCO
18./19. aŭgusto 1928, Göteborg

Raporto. — Por fina enpreso ĉiu delegito antaŭe preparu resumon de sia parolado. Amplekso estu 500—750 vortoj. Kompreneble la delegito povos paroli pli longe en la Konferenco mem. K-do S. H. Brooks (8500), kiu multe helpis per maŝinskribado de cirkulero pri la konferenco, proponis diskutindan planon por biciklistoj, kiuj volas rondvojaĝi en Britio dum 12 tagoj en junio, julio aŭ aŭgusto dum 1929. Li mem prenos kiel sperta biciklisto la gvidadon de la haveno, kaj li taksas la koston potagan je 6—9 ŝilingoj.

—o—

Karavano de Berlin. Kiel K-do Muravkin sciigas al ni, ĝis la 1. aŭgusto anoncis sin 41 K-doj por la karavana veturo. Oni antaŭvidas la partoprenon de 50 K-doj. Relegu detalojn pri la aranĝo en n-o 198.

PRI LA SAT-VORTARO

Nia Kolektivo laboradas. Slipoj amasiĝas kaj ne povas esti dubo, ke antaŭ la fino de l' jaro jam kompostistoj ankaŭ povos eklabori al nia Vortaro.

Ni jam diris, ke tiu nia entrepreno vekis grandan intereson en la tuta esperantistaro. Fakto estas, ke jam multaj ne-SAT-anoj mendis la libron kaj antaŭpagis. Ni ne plu povas havi eĉ plej malgrandan dubon pri la plena sukceso de la afero.

* * *

Kompreneble tia sukceso ne plezurigas ĉiujn "samideanojn". Ĵaluzo enrampas kaj inside provetas malhelpi. Ni avertas la ĵaluzemulojn, ke ili kredeble havos post nelonge denovan motivon por kolere malbeni la diablajn SAT-anojn! Dume ni antaŭeniru!...

* * *

Sekve de nia alvoko por kunlaboro, publikigita en "S-ulo" kaj en "Heroldo de Esperanto", ni jam ricevis multajn interesajn manuskriptojn. Ni transdonis ilin al nia Kolektivo kaj ĉi tie dankas al ĉiuj kunlaboremuloj. Ni rediras, ke ĉiu rimarko, ĉiu atentigo, ĉiu konsilo aŭ sugesto estas bonvenaj kaj atentataj. Ne prokrastu konigi al ni pri la spertoj, kiujn vi faris dum via longa uzado de nia lingvo.

E. L.

* * *

Ni memorigas, ke la limtempo por profiti la favoran prezon estas la 30. septembro 1928. Ĉar ni jam estas certaj, ke ni havos sufiĉe da mono por la eldono, ni ne plilongigos la limtempon. **Rapidu antaŭpagi du ekzemplerojn por ricevi tri.** Post du monatoj estas jam tro malfrue. Monon oni sendu ĉu al Direkcio de SAT, 23 rue Boyer, Paris 20e, ĉu al Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

BILANCO DE LA VI-a SAT-KONGRESO EN LENINGRAD

Fine trafis nin ia "bilanco" pri nia VI-a Kongreso. La Leningrada Kongreskomitato bezonis du jarojn por havigi al ni la ĉi-suban kalkulon. Sendube la legantoj kiel ni miros pri kelkaj partoj el tiu bilanco ...

Direkcio de SAT.

Enspezoj

	en rubloj	
Kongreskotizoj	665.52	
Municio	350.76	1016.28

Elspezoj

Pagita por komunloĝejoj de kongresanoj . . .	112.80	
Pagita por nutrado . . .	255.25	
Ornamado	70.93	
Tramveturado de kongresanoj	290.50	
Diversaj elspezoj . . .	167.58	
Kancelariaj elspezoj . .	63.62	
Subvencio por vojaĝelspezoj de kelkaj kongresanoj	55.50	1016.18

Subskribis: Financa administranto de l' Kongresa Komitato A. Dunaev.

Mortis pioniro

La 14-an de julio mortis en urbo Helsingborg (Svedio) maljuna sveda esp. pioniro G. Backman. Li esp-istiĝis antaŭ tridek jaroj k estis inter la unuaj amikoj de D-ro Zamenhof. Por esp-o li faris en Svedio grandegan laboron, eldonante vortarojn k lernolibrojn. Rimarkinda estas saluto, kiun li sendis al pasintjara kongreso de Sveda Lab. Esp. Asocio. En ĝi li deklaras, ke li en la anarkisma komunismo vidas la feliĉon de la homaro. Ĵus antaŭ sia morto li eldonis tradukon de libro de sveda verkisto Strindberg: "La konscienco riproĉas", verko kontraŭmilita k kontraŭmilitista. (7987)

«o»

Esperanto k parolfilmoj

"Daily News" (Tagaj Novaĵoj), plej disvastigata tagĵurnalo en Nov-Jorko, publikigis 4. julio deklaron de direktoro Cl. Brown (filmfabrikanto), laŭ kiu parolantaj filmoj absolute necesigos esp-on. "La filmo-produktistoj nepre propagandos la lernadon de universala lingvo. Fari apartan filmon por ĉiu lingvo, estos finance neeble. Nura solvo estas esp-o." Parolfilmoj nun rapide disvolviĝas. Same kiel por Radio, esp-o por tiu industrio ludos grandegan rolon. Por subteni la propagandon k konvinki la estraron, oni skribu al jenaj grandaj produktistoj de parolfilmoj: Werner Bros. Pictures, Inc., 1600 Broadway, New-York, USA., kaj Jesse L. Lasky, Paramount Bldg., New-York. J. D. Sayers.

«o»

K-doj kursgvidantoj! Instruistaro en nia urbo ne volas instrui esp-on al sia lernantaro, ĉar ili ne scias, kiel en aliaj landoj la instruistoj uzas esp-on por eduko k instruo. Bonvolu sendi mallongajn raportojn pri "esp-o kiel instrua helpilo en lernejo" al: Esp. Informejo, Schweidnitz (Germ.). (1851)

KOMPARAJ SPEZOJ

SAT 1927

Elspezoj

Administraj	1523,87	mk. g.
Korespondado (afranko) .	671,58	„ „
Salajroj (4 pers.)	8986,58	„ „

UEA 1927

Elspezoj

Administraj	3200	mk. g.
Korespondado (afranko) . .	5120	„ „
Salajroj (7 pers.)	21 280	„ „

* * *

SAT

Enspezoj . . .	57 035,82	mk. g.
Elspezoj . . .	53 324,50	„ „
Saldo-profito .	3 711,32	mk. g.

UEA

Elspezoj	66 000	mk. g.
Enspezoj	60 068	„ „
Saldo-deficito . . .	5932	mk. g.

* * *

Tiu komparo de kelkaj ciferoj el la bilancoj de SAT kaj UEA klare evidentiĝas, kiel ni laboras ĉe SAT kaj kiel ĉe UEA.

Plie oni devas konsideri, ke UEA nur havas monatan revuon kaj ke ĝi estas ekspedata flanke de la presejo. SAT havas semajnan gazeton kun aldono: "La Lernanto", 1 monatan revuon, kaj libroservon. En la Administrejo de SAT ni mem ekspedas la gazetojn; tiu ekspedado postulas ĉiusemajne 1½ tagon da labortempo.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

DANIO. Lab. esp-istoj ĵus eldonis unuan n-on de propra lab. esp. organo "La Torĉo". Ĝi estas kvarpaĝa, belpresita, ĉefe en dana lingvo, formato 18×23 cm. Abonprezo 1 dana krono. Adr. de l' red.: Harry Nielsen, Kochsgade 47, Odense, Danio. (Ni deziras bonan sukceson al nia nova kunbatalanto! — Red.) — **SOVETIO. Dnepropetrovsk.** 6. 7. la lokaj esp-istoj havis grandan feston, ĉar alvenis germania SAT-ano. K-do V. Brojer. Li restos ĉi tie 6 monatojn. La esp-istoj, kiuj neniam ĝis nun havis okazon, paroli kun eksterlandano, akceptis lin kun grandega ĝojo k serĉas laboron por li. Li rakontis pri esp. movado k lab. vivo en Germ. En du lokaj gazetoj aperis notoj pri lia vizito. (10 262) — **Ivanovo-Voznesensk.** Okazinta en fino de majo 3-a Gub. Esp. Konferenco konstatis ne larĝigon, tamen pliprofundiĝon de la movado. Laboristoj en SEU-organizo estas 70%, komunistoj 30%. Esp.-aktivularo ĉiuĵaŭde kunvenas en "teksista" Ĝardeno jam preparante sin por la vintra laboro. Stefan.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Travail (Laboro), Genéve, 11. 7., Instrua okazo (190); Tagblatt, Linz, 29. 6., Hodiaŭaj ĉininoj (192), Tago el vivo (Dolinskaja), 7. 7., Lando de suno k malsato (193).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Sächs. Arb.-Zeitung, Leipzig, 10. 7. (kongr.), 11. 7.

Pri nia Vortaro enpresis:

Heroldo de Esperanto, n-o 28, La Fervojisto, Zagreb, jul./aŭg.

«»

Die Einheit (La Unueco), Berlin, finpublikigis en siaj n-oj 14 k 15 la trad. de "Nur Volu". En n-o 18 aperis esp. lingva alvoko al SAT-anoj pri kunlaboro.

INTER NI

— SAT devas batali kontraŭ la kapitalismo, kontraŭ la imperialismo, kontraŭ la militarismo, kontraŭ . . .

— . . . Ne, milfoje ne! . . .

— !!?? . . .

Ĉu do jam delonge ne ekzistas partioj, sindikatoj kaj aliaj organizoj, kiuj tute klare difinis al si tiujn taskojn? Ĉu do vi volas, ke nia Asocio konkurencu kun ili?

SAT ne kapablas kaj sekve ne devas batali kontraŭ tiuj diversaj ismoj. Ĝi nur povas havi kiel taskon sciigi, diskonigi kiel la socialistoj, la komunistoj, la anarkistoj, la kooperativistoj k. a. plenumas tiun batalon. Per tio la SAT-anoj povas kompari la rimedojn kaj metodojn uzatajn en la diverslandaj, diverstendencaj organizoj. Per tiaj informoj ili "batalu" en siaj propraj partioj kaj organizoj por akceptigi la rimedojn kaj metodojn, kiuj ŝajnas al ili la plej bonaj . . .

— Sed tio estas tamen kontraŭbatali la supremenciitajn ismojn . . .

— Eble, sed estas ia nuanco en la maniero prezenti la aferon. Kaj nuancoj ludas rolon en la vivo. Ni ĉiuj konsentas, ke SAT devas havi kiel celon meti esperanton je la servo de l' tutmonda Proletaro. Ĉu estus bona maniero, se per esperanto ni volus plenumi la samajn taskojn, kiujn jam plenumas aliaj pli kvalifikitaj por tio organizoj? . . .

Ĉu do estas tiom malfacile kompreni, tion, kio estas nigre sur blanke skribita en nia Statuto? Vi relegu ĝin atente, penante kompreni ĝian profundan signifon, kaj eble vi komprenos, ke SAT havas kiel celon batali nur kontraŭ la malklerecon kaj fanatikecon, kontraŭ ĉiajn dogmojn kaj rutinojn.

Kiam ekzistos en la mondo kelkaj dekoj da milionoj da laboristoj scipovantaj esperanton, tiam la tiutempaj vivantaj SAT-anoj povos eble kun ia praveco difini al esperanta asocio politikajn taskojn. Dume ni estu modestaj. Ni pliperfektigu nian interhelpan, informan, klerigan, edukan aparaton, kaj ni ne ridindigu nin, celante difini al SAT taskojn, kiujn ĝi plenumi ne povas.

Se K-do akiras per konstanta uzado de esperanto pli da klereco; se per la SAT-aparato li povas bone informiĝi pri ĉio, kio interesas la tutmondan laboristan movadon, ne povas esti dubo, ke li fariĝos pro tio plej bona batalanto en sia partio, en sia sindikato, en sia kooperativo aŭ en alia simila organizo. Sed en tio nur limiĝas la rolo de SAT.

En revolucia periodo, kiam temas preni la armilojn por ataki aŭ sin defendi kontraŭ la faŝismo, ne SAT, sed la partioj aŭ sindikatoj gvidas la batalon. Sekve estas tute sensence postuli, ke nia Asocio difinu al si taskojn, por kies plenumo jam ekzistas aliaj organizoj...

E. L.

NIA POŜTO

Ael. — Ricevis vian artikolon pri esp-o ĉe burĝoj k laboristoj. Ni ne povas enmeti: vi simple penadas malfermi malfermitan pordon, t. e. ke jam delonge nia Legantaro estas konvinkita pri la praveco de viaj rimarkoj.

E. L.

9437. — Ĝis nun mi ne enmetis vian artikolon pro jenaj kialoj: 1. Ĝi estas tro longa; 2. vi ne sciigis, el kiu lingvo, el kiu gazeto aŭ libro vi eltradukis; 3. ni ĉiam preferas originalojn; 4. la spaco ne ĉiam ebligas enmeti ĉiun materialon, kiun ni ricevas. Ni povos uzi vian skribaĵon nur en okazo de nepra bezono. E. L.

1851. — Vian artikolon pri la fiziokrata movado ni intencas publikigi; sed se vi postulas tujan aperigon, ni tion ne povas promesi. E. L.

7714. — Ni ne havas eblon kontroli, ĉu ĉiuj korespond-anoncantoj en "S-ulo" akceptas la vidpunkton de klasbatalo.

2921. — Ni ne plu posedas vian tekston pri karavano, konstatinte post komparo, ke ĝia enhavo estas identa kun tiu sendita al ni de Leipzig. Noton trovu en tiu ĉi n-o.

9310. — 1. Ĉu do vi ne legis pri la Lit. Komisiono de SAT? Al ĝi vi devas unue sendi vian tradukaĵon. 2. Ĉu vi ne legis en "S-ulo" pri la verkoj jam pretaj por eldono k kiuj atendas pro manko de mono?

Al kelkiuj. — Ni ne povas enmeti senpage komunikojn, kiuj havas anoncan karakteron. Niaj presistoj ne laboras senpage.

12 408. — Via rimarkigo estas tute prava. En nia manuskripto mem troviĝis la korekta formo "Maksim". Sed ial la kompostistoj fuŝis.

9425. — Aperos ĉu en "S-ulo", ĉu en "L. L.", sed pri la dato ni ne povas jam decidi.

1897. — Vian prilingvan artikolon ni ricevis k ni aperigos ĝin tuj kiam spaco permesas. N. B.

13 021. — Se vi deziras, ke ni peru viajn let., tiam bv. aldoni afrankon.

Al kelkaj. — Se vi sendas koresp. anoncojn, tiam sendu ankaŭ sufiĉan monon, alie ni devas mallongigi ĝin ĝis certa grado. Simpla koresp. anonco por 0.50 mk. nur povas havi 90 ĝis 100 literojn inkluzive adreson.

3004. — Vi pagis tro malmulte por via anonco. Mankas ankoraŭ 1,16 mk. g.

Adm.

KORESPONDADO

AŬSTRIO

— Por ekspozicio, okazonta fine de sept., la esp. rondo de orient-fervojistoj en Vieno, dez. ekspoz-materialon. Ĝi ankaŭ koresp. individue k kolektive kĉl. L, PK, PI, bfl. Adr.: Josef Zink, Dampfgasse, 21/6, Wien 10.

GERMANIO

K-do Jakob Hotz, F. 4, 12, Mannheim, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj, precipe pri komunismo k sport-movado. Resp. garantiata.

PORTUGALIO

Adresŝanĝo: "Nova Vojo", R. do Ataide, n-o 6, Lisboa.

SOVETIO

— Mariinska esp. ekspozicia k-to tre dankas al ĉ. gek-doj k organizoj, kiuj sendis al ni ekspoz-materialon.

— Biblioteko de suda fervojo dez. koresp. kun bibliotekistoj de aliaj landoj. Adr.: Sebastopol, Biblioteko de Jeldorogin.

— Ĉelo de junkom-istoj en mara fabriko, dez. koresp. kun junkom-istoj k komunistoj el ĉl. Adr.: Sebastopol, Marskoj Zavod, farejka KSM.

— Fervojlaboristoj de suda fervojo, dez. koresp. kĉl. fervoj-laboristoj. Adr.: Sebastopol, Mestkom Jeldorogi.

K-do Vladimir Mioduŝevskij (17 j.), Poĉajevska-str. 44, Kiev, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

— Administranto de Biblioteko ĉe Centra Metalista Klubo, Centralna Biblioteka Metallistov, Krasnoarmejska-str. 51-a, Kiev, dez. koresp. kun lab. bibliotekistoj de Eŭropo k Ameriko.

— Individuaj gejunkom-istoj k ĉeloj skribu al nia lerneja ĉelo pri via laboro. Koresp-ado estu daŭra. Adr.: B. Smirnov, Pless, Iv.-Voznesensk. gub.

Atentu, Radio-amatoroj!

Fine de septembro la Germ. Lab. Radio-Asocio, Loka Grupo Mannheim okazigos ekspozicion por radio-amatoroj. Ni petas salut-leterojn, fakan literaturon, ĉu esp. aŭ alilingvan ktp. Ĉiujn skribaĵojn oni adresu al: Otto Dreissig, **Mannheim,** T. 6, 10 (Germ.).

Lab. Radio-amatoroj, estu solidaraj!

ATENTU, JUNKOMUNISTOJ!

Dezirante kunligi nin koresponde kun eksterlandaj junkomunistoj, ni petas priskribadi viajn vivon, laboron, batalon ktp. Resp. garantias SAT-ano 9322. Korespondas esp. rondeto ĉe Petrograda Komitato Komjunulara (VLKSM). Adreso: **Leningrado 22,** Skorohodov-strato 19, Rajkom Komsomola, al esperanto-rondeto.

ATENTU!

Sendu porinfanajn ilustr. gazetojn el ĉ. 1., rekompence samon aŭ belartajn PK sendos K-do Stefan, ŝkola 3-a Internacionala, **Ivanovo - Voznesensk** (Sovetio).

Atentu, kompostistoj-tipografistoj!

Por aranĝi esp. varbkunvenon kun lumbildoj k referato inter la kompostista junularo mi bezonas div. malgrandajn presaĵojn: afiŝetoj, kartetoj, invitiloj por kunvenoj k festoj ktp. en ĉ. naciaj lingvoj, precipe en orientaj lingvoj kun esp. klarigoj. Adr.: K-do Max Schmitt, Seckenheimer Str. 120, **Mannheim** (Germanio).

KIU NEGERMANA K-DO

havas okazon komence de oktobro veni al **Essen** (Ruhrregiono) por paroli, dum varbaranĝo de la ĉi-tieaj kulturorganizoj? Por vivado ni volonte zorgos. Bonvolu tuj skribi al **W. Stertzenbach,** Viehhoferstr. 147, **Essen** (Germ.)

ENHAVO:

	paĝo
Faŝisma kulturo	367—68
La veraj realistoj	368—69
Grava atentigo	369
Semajno el niaj ferioj	369—71
Letero el Portugalio	370
Studenta Sekcio de SAT	370
Tra Studentio, Petoj, Nia poŝto	371
Tago el mia vivo	371
Tra Esperantio	372—74
Korespondado, Anoncoj	374

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)